



Dimitrije Janičič <i>Montenegro</i>	uverturo	3
Zlatoje Martinov <i>La nekompatema Eŭropo</i>	aktuale	4
FEM-komitato <i>Pri la Novjarnokta perforto</i>	novjara deklaro	5
Giorgio Silfer <i>Holokaŭsto pli hororas en distopia komikso</i>	nia kovrilo	6
Otto Gabos <i>Du paĝoj el "Esperanto"</i>	bildromano	8
Fabrizio Pennacchietti <i>Pensvagado pri profetoj kaj profetaĵoj</i>	filologio	10
Armando Zecchin <i>Pri homaj rajtoj kaj ties fontoj</i>	debato	16
Leif Nordenstorm <i>"Adoru", bunta diserva libro</i>	religio	19
Carlo Minnaja <i>La Lingva Komitato inter 1914 kaj 1920</i>	historio	21
Giorgio Silfer <i>Itala nutre, brazila sekse</i>	kino	28
Zlatoje Martinov <i>Poeto Dimitrije Janičič iĝis 80-jara</i>	intervjuo	30
Dimitrije Janičič <i>La malpermesata amo</i>	ekskluzive	33
Italo Calvino (Nicolino Rossi) <i>La fajfo de la merlo</i>	itala literaturo	36
Carmel Mallia <i>Transflugo, tria parto</i>	rememoroj	41
Danilo Kiŝ (Agnesa Eremija) <i>Glore estas por la patrujo morti</i>	balkana prozo	44
Sara Spanò recenzas <i>Poezio: ĉefa ingredienco de resaniga eliksiro</i>	en vitrino	48
Julian Modest recenzas <i>Vivo dediĉita al la homa interkompreniĝo</i>	en vitrino	51
Sen Rodin <i>Ĉu perspektivo aŭ kiel eviti la katastrofon?</i>	humuro	54

Montenegro

de Dimitrije Janičič

*Ŝtonaj klifoj tenas ĉielon
arboj brakumas ŝtonojn –
ventoj tra montkoloj kantas ariojn.*

*Ŝtonaj kanjonoj
infanoj de akvo –
inter krutegaj bordoj serĉas lumon.*


*Tempo – ŝtonhakisto
en vizaĝoj homaj –
skulptas grandan pezon de daŭro.*

*Kruda vizaĝo
kaŝas malmolan animon –
malfacilaĵoj facetas juvelŝtonon.*

*Vojojn ili traboras
tra ŝtongrundo –
plej ofte ŝoseojn por eterne foriri!*

*Akvon oni gardas
nur en ŝtonaj ujoj –
kaj akvo dum jarcentoj
forkuras tra ŝtonoj.*

*Ŝtona beleco
de nigraj montoj –
mia lando – Montenegro.*



Pensvogado pri profetoj kaj profetaĵoj

de Fabrizio
Pennacchiatti

Lastatempe ofte reaperas tra la amaskomunikiloj la vorto *profeto* kaj eĉ la vorto *kalifo*, kiu, laŭ sia araba etimologio, proprasence signifas “posteulo (vikario)” de profeto. Pri la vortoj *profeto* kaj *profetaĵo* oni konstatas ke, dum la paso de jarcentoj, ekde la klasika antikveco, tra la kristana kaj latina mezepoko ĝis humanismo kaj niaj tempoj, ili alprenis ne malvastan skalon da sencaj nuancoj, kaj ke, almenaŭ en Okcidento, ili iompostiome sekulariĝis, apenaŭ konservante sian originan semantike religian valoron. Tial, en la nuntempa lingvouzo, per “profetaĵo” oni prefere indikas laikan antaŭdiron de dezirataj politikaj kaj sociaj ŝanĝoj ol enigman kaj viziĉecan antaŭdiron.

Ĉiuokaze, estas kutime nomataj “profetoj” divenistoj kaj aŭguristoj aliĝintaj al orakolo, aŭ karismaj religiaj reformistoj, sed ankaŭ poetoj kaj inspiritaj filozofoj kaj fervoraj iniciatintoj de politikaj mesianismoj aŭ utopioj: ĉiu el ili ja estas iasence profeto ĉar li/ŝi antaŭdiras kaj antaŭvidas estontajon. Kion tamen origine

signifis profeto? Ĉu ni estas certaj ke ĝia origina signifo precipe indikis homon kiu, vole aŭ nevole, posedas la talenton antaŭsenti estontajn eventojn?

La plej vaste akceptata etimologio de *profeto*, vorto paŭsanta la grekan vorton *προφήτης*, asertas ke la greka prefikso *pro-* antaŭ *-fet-* (unu el la radikformoj de la greka verbo *phemi* “mi diras”) signifas kaj “antaŭtempe” kaj “anstataŭ” aŭ “laŭ komisio de tria persono”. Laŭ tia etimologio, profeto estas do kaj homo kiu parole anticipas la estonton, kaj homo per kies voĉo diskonigigas revelacio.

Vane tamen ni serĉus konfirmon, en la vortaroj kaj gramatikoj de la malnovgreka lingvo, pri la ĵus menciitaj signifoj de *pro-* kiel prefikso same kiel de *pro* kiel prepozicio. Male, konsultado de tiaj verkoj kaj povoscio de greka lingvo montrus ke, ambaŭkaze, *pro(-)* spacosence signifas *antaŭ*, *fronte al*, dum tempasence ĝi signifas *antaŭtempe* kaj, krome, *avantaĝe de*, *defende de* kaj *favore de*.

Fakte, antaŭ ol alpreni la por ni familiaran orakolan sencon, *προφήτης* simple indikis homon kies tasko estis laŭvoĉe alparoli publikon – ne gravas ĉu ĝi multnombris aŭ malmultis – kiel kutime faris heroldo de sporta konkuro aŭ simpoziestro. Se temas pri la aŭgura senco de *προφήτης*, tia nomiĝis la profesia interpretisto de dia volo kiu ĝin proklamis al la pridemandintoj la orakolon. Nur pere de la greka lingvo de Septuaginto* kaj de la Nova Testamento unuafoje aperis la nuna, tipe ‘okcidenteca’, signifo de profeto.

La judaj saĝuloj de Aleksandrio, kiuj decidis jam en la kvara jarcento a.K. traduki greklingven la tutan Malnovan Testamento por la grekparolantaj judaj komunumoj de la diasporo, ne trovis pli taŭgan grekan terminon ol *προφήτης* por traduki la koncepton esprimitan per la hebrea termino *nabi*’ [*navi*]. Tiu ĉi termino apartenas al ĉiuj proksimorientaj semidaj lingvoj kiuj heredis la pli altan asir-babilonan kulturon.

Nu, en la leteroj de la deknaŭa jc a.K., elfositaj en Mari, arkeologia loko ĉe Eŭfrato en Sirio, aperas la vorto *nabi* kiu verŝajne indikas apartan tipon de aŭguristo. La akada (asir-babilona) verbo *nabû(m)*, de kiu *nabi* venas, signifas tamen “nomumi, elekti”, tiel ke *nabi* probable signifis “elektito”. Tamen, ekster la argilaj tekstoj el Mari, tiu vorto ne signifas “elektita aŭ rajtigita aŭgu-

risto”; ĝi male aperas kiel epiteto de ĉiu reĝo: “la dielektito”. Temas evidente pri titolo inspirita de la sumera kortega ceremoniaro, ĉar la persona nomo *Gudea* de la fama sumera reĝo de Lagaŝ (22^a jc a.K.) estas kutime interpretata kiel “la elektito”. Aliloke, en asir-babilona Mezo-potamio, havis la saman signifon de *nabi* el Mari la vorto *mahhûm*, ingenre *mahhûtum*, “ekstazulo/ekstazulino”, el la verbo *mahûm* “esti furioza, agitoplena, baraktema”.

En I Samuel 9:9 ni trovas interesan antikvaĵan rimarkigon: *En la antaŭa tempo ĉe Izrael oni tiel diradis, kiam oni iris demandi Dion: “Ni iru al la antaŭvidistoj!”*, ĉar *kion oni nun nomas profeto (nabi)*, *tion oni antaŭe nomis antaŭvidisto (ro’e)*.

Ŝajnas ke en la plej antikva epoko atingebla per la bibliaj tekstoj la tielnomitaj “profetoj” formis socian klason de homoj animitaj de aparta religia entuziasmo kaj arĝintaj en fratularoj. Tiaj piaj societoj troviĝis kaj ĉe la kanaanaĵ paganaj popoloj (vidu la profetojn de la dio Baalo kiujn



Diorita statueto de reĝo Gudea

* Septuaginto estas greka traduko de la hebrea Biblio, farita samtempe sed indvidue de 70 aŭ 72 heleinigitaj judoj en Aleksandrio sub la Ptolemeoj ĉirkaŭ 280 a.K. Ĝi estas la versio de la Biblio citita en la Nova Testamento kaj eĉ hodiaŭ ĝi estas la preferata versio de ortodoksismo. La nomo devenas el la latina vorto *septuaginta* (sepdek).

Eliaj ekstermis sur Monto Karmelo, I Reĝoj 18:20-40), kaj ĉe la monoteismaj hebreaj triboj. Oni ilin regule konsultis por interpreti la dian volon, sed verŝajne ilia ĉefa tasko ne estis tiom anonci estontajn eventojn, kiom prefere praktiki formojn de asketeco kaj kanti la laŭdojn de ilia protektanta dio. Kelkaj el ili, aŭtentaj "homoj de Dio" kiel Elia kaj Eliŝa, distingigis kiel miraklistoj.



Profeto Elia, helpo de ĉiela fajro, triumfas super la profetoj de Baal.

Konfirmas tiun vidpunkton – rigardi profeton precipe kiel mirakliston – pluraj atestoj el la Nova Testamento, nome el la rakonta korpuso kiu plej fideinde prilumas la pensmanieron regantan en Palestino dum la unua post-biblia periodo. En la epizodo de la revivigo de la filo de la vidvino el Nain en Galileo, homo kiu spektis la mirindaĵon difinis Jesuon "granda profeto" (Luko 7:11-17). Same, kiam Jesuo petis siajn disĉiplojn raporti kiel la homamasoj lin difinas, ili respondis: *Johano la Baptisto; sed laŭ aliaj: Elia; kaj*

laŭ aliaj, ke unu el la antikvaj profetoj relevigis. (Luko 9:18-19). Jen do la figuro de profeto koincidas kun la figuro de miraklisto.

Koncerne la profeton Elia kiel farinton de sensaciaj mirakloj, malfruaj redaktistoj de la biblia teksto ne pardonis lin, en I Reĝoj 17:19-23, pro tio ke li revivigis mortintan infanon, la filon de la vidvino el Carfato, imitante la dian agon (Genezo 2:7) enblovi en lian nazon la spiron de vivo. Tial ili anstataŭigis la originan verbon "li blovis sur" (*way-yippah 'al*), kiun atestas grekvorte Septuaginto, per ne probable "sin etendis sur" (*way-yitmoded 'al*), tiel akirante iom embarasan rezulton:

(19) *Kaj diris al ŝi Elia: "Donu al mi vian filon". Kaj li prenis lin el ŝiaj brakoj, kaj portis lin en la subtegmentejon, en kiu li loĝis, kaj metis lin sur sian liton.* (20) *Kaj li vokis al la Eternulo, kaj diris: "Ho Eternulo, mia Dio! Ĉu eĉ al la vidvino, ĉe kiu mi loĝas, Vi faros malbonon, mortigante ŝian filon?"* (21) *Kaj li etendis sin super la infano tri fojojn, kaj vokis al la Eternulo, kaj diris: "Ho Eternulo, mia Dio, revenigu la animon de ĉi tiu infano en lian internon!"* (22) *Kaj la Eternulo aŭskultis la voĉon de Elia, kaj la animo de la infano revenis en lian internon, kaj li reviviĝis.* (23) *Kaj Elia diris: "Rigardu, via filo vivas".*

Rimarkindas ke, en versiklo 17:21, la Zamenhofa traduko

prude substituas la prepozicion "super" al "sur".

Rilate la ne duarangan funkcion de la bibliaj profetoj, nome kanti laŭdojn al Dio, ni rimarkas ke la kvalifikon "profetino" (*nebi'a [nviyà]*) alprenis Mirjam, fratino de Moseo, kiu deklamis venkokanton je la eliro de la hebreoj el Egiptujo (Eliro 15:20), kaj ankaŭ Debora, kiu same deklamis faman venkokanton laŭdante la Eternulon, dion de Izrael (Juĝistoj 5:2-31). En la Nova Testamento oni male prezentas kiel profetinojn la patrino de Johano la Baptisto, nome Elizabeton, kiu *pleniĝis de la Sankta Spirito* (Luko 1:41), kaj Anna, la vidvino kiu akceptis Jesuinfanon prezentitan en la templon (Luko 2:36-38). Ne mankas tamen en la Biblio aŭguristinoj kiujn oni difinis profetinoj, kiel Hulda (II Reĝoj 22:14) aŭ Noadja (Nehemja 6:14), se ne menciis la kvar senedzajn filinojn de la apostolo Filipo (Agoj 21:9), ili ankaŭ profetinoj. Nur unu fojon en Biblio, koncerne la edzinon de profeto Jesaja – ĝuste kiel en la jida lingvo *rebbetzin* indikas la edzinon de *rebbe* "rabeno" – la vorto *nebi'a* "profetino" signifas "profetedzinon" (Jesaja 8:3).

La temo pri profetinoj en la Malnova kaj Nova Testamentoj kondukas nin al la sibiloj, legendaj aŭguristinoj kiujn Aristotelo difinis melankoliaj. Ilin alproprigis al si, pere de la apokrifaj *Sibilaj Libroj*, la


"ne cirkumcidita" eklezio, nome la eklezio kies anoj devenis de iam paganoj familioj. Presentante la sibilojn kiel antaŭvidintinoj de la enkarniĝo de Kristo la ne juddevenaj kristanoj de la unuaj jarcentoj depostulis por si mesianisman profetan dignecon kiu alimaniere estus rigardata eskluziva privilegio favore al la virseksaj



La Sibilo el Delfo, laŭ Mikelaĝelo, en la Siksta Kapelo.

profetoj de la Malnova Testamento. Do, dum en la antaŭkrista epoko ĉe la judoj la malnovtestamentaj profetoj iel antaŭvidis la enkarniĝon de Jesuo, ĉe la paganoj tion saman faris la sibiloj. Per severaj mienoj kaj rigardoj nun la sibiloj nin esploras el la volboj de la Siksta Kapelo en Vatikano kaj de aliaj katolikaj preĝejoj.

Renkonto inter Salomono kaj la reĝino de Seba.



En frua mezepoko, en la nombron de la dek sibiloj ŝtelume enŝoviĝis pridebatata persono, al kies luciferodoraj travivaĵoj aludas ankaŭ Korano (27:16-44). Ŝi estas la Reĝino de Ŝeba (I Reĝoj 10:1), kiun oni identigis kun *Sabbe* aŭ *Sambethe*, la tielnomita Hebrea Sibilo. La “Reĝino de la Sudo”, pri kiu oni rakontas ke ŝi eniris la kristalpavimitan tron-salonon de Salomono vestante longan jupon por kaŝi la troan vilozon de siaj gamboj, jen transformiĝis en pian ĉefro-

lulon de grava epizodo de la *Historio de la Vera Kruco*. Tiun epizodon priskribis Jakopo el Varaco en la *Ora Legendo* kaj ĝin pripentris Piero della Francesca en du fresko-kvadratoj en la absido de la preĝejo de Sankta Francisko en Areco, Italio [vidu la suban reproduktion].

La kristaltegita pavimo, kiun la reĝino konfuzis kun akvosurfaco, jen transformiĝas al la jerusalema torento Kedron, sur kiu, kiel pas-tabulon, oni iam ŝetis trabon. La reĝino intuciis

ke mil jarojn poste tiu trabo fariĝos la eŝafodo de ido de Salomono, nome la kruco de Jesuo. Vadinte la torenton per ne treti kaj profani tiun trabon, ŝi alkuris al Salomono kaj al li rivelis la ricevitan profetaĵon.

Probable la araba lingvo transprenis de la jud-aramaea aŭ kristan-aramaea *nbiya* [nwiya] la vorton *nabi* por indiki profeton laŭ ĝia biblia senco. La islamanoj kiuj parolas perse aŭ turke preferas tamen uzi la samsignifan persan terminon *peygamber*, laŭvorte “vorto(*peygam-*)portanto(*-ber*)” de Dio.

Laŭ Islamo, Adamo inaŭguris longan ĉenon da profetoj kiu finiĝis kun Muhammad, la “Sigelo de la Profetoj” (Korano 33:40). Eble mirigas la fakto ke tiu profeta ĉeno inkluzivas ankaŭ Sanktan Georgon, kiun islamanoj nomas *Nabi Ĝirĝis*. La devoteco por la sankta kavaliro disvastiĝis eĉ en Indonezio. Aparte devota al li estis Timuro (1336-1405), la “Skurĝo de Dio”, kiu ŝatis sin difini *ghazi* “batalanto por la fido”. Nel 1393 tiu mongola imperiestro konstruigis honore al li en Mosulo, norda Irako, imponan tombomonumenton kun apuda moskeo. Ĝin bombe detruis pasintjare la sanktul-malamikoj de la Islama Ŝtato.

Rimarkindas ke la profetoj kiujn Islamo agnoskas neniam profetadis nek necese faris miraklojn. Ili simple ricevis de Dio la mision instrui la homojn pri la principoj de la religia leĝo, leĝo kiu nur pere de la

profeto Muhammad akiris sian definitivan formuladon.

Konklude, profeto kaj profetaĵo estas vortoj kies korpo estas greka sed kies animo estas hebrea, kaj tial ili fariĝis heredaĵo por preskaŭ ĉiu lingvo kaj kulturo kiu

baziĝas sur la Biblio: ekde la juda kulturo de post la detruo de la Dua Templo ĝis la eŭropaj lingvoj kaj kulturoj kun grekaj kaj latinaj radikoj. Cetere, la latinidaj kaj germanaj lingvoj konformigis la du grekdevenajn vortojn al siaj elparolaj kaj skribaj kutimoj; male la slavaj lingvoj sin helpis per fidindaj kalkeoj kiaj ruslingve *prorok* kaj *prorocestvo*. Nur la islanda lingvo, pro sia ĵaluza izoliteco kaj insuleco kaj sia obstina rifuzo pri internaciaj terminoj, daŭre uzas tiucele du vortojn hereditajn de la skandinava pagana tradicio: *spámaður* “aŭguristo” e *spá* “aŭguro”.

Laŭ Paŭlo el Tarso, *profetanto* parolas al homoj edifon kaj konsilon kaj konsolon. (I Korintanoj 14:3). Se ni sukcesus tion fari por niaj kunhomoj, tiam vere ĉiu el ni rajtus nomiĝi profeto. ☼



La enigma mieno de la reĝino de Ŝeba dum ŝi kliniĝas al Salomono, ankoraŭ laŭ fresko de Piero della Francesca.